Nova specimeno de la Internaciaj Ekzamenoj

**Parola parto**
**Meza nivelo**

Poentoj: 50 Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 15-20 minutoj
La kandidatoj estas ekzamenataj unuope dum ĉ. 15-20 minutoj.

## 1. Bild(stri)o

*La kandidato ricevas bild(stri)on kaj devas klarigi la situacion prezentatan tie. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj. (Por blinduloj troviĝas objektoj prezentantaj unu ideon aŭ okazaĵon, ekz. butikon, oficejon, feston. Eblas ankaŭ fari rakonton laŭ kasedaj sonoj.)*

Rigardu la bildon kaj klarigu dum ĉ. 5 minutoj, kio okazas. Estu preta respondi demandojn de la ekzamenantoj.

(15 poentoj)

## 2. Esperanto-kulturo

*Laŭ hazardo oni elektas por ĉiu kandidato po du demandojn el listo simila al la suba. La kandidato devas respondi ilin dum maksimume kvin minutoj. Por taksi la respondojn la ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.*

1. Priparolu la multfacetan eminentulon Gaston Waringhien kaj liajn diversajn kontribuaĵojn al la Esperanta kulturo.
2. Kontraste priskribu la 3 esperantlingvajn gazetojn *Monato, Juna Amiko,* kaj *Esperanto*. Klarigu kion ĉiu el ili kontribuas al la Esperanta komunumo.
3. Resumu la aktualan staton de dramo, filmo, kaj muziko en Esperantio.
4. Nomu almenaŭ du programojn en la hodiaŭa Esperanta komunumo kiuj pegulas la internan ideon de d-ro Zamenhof, responde al specifaj homaj bezonoj. Resumu iliajn celojn.
5. Elektu originalan Esperantan romanon unue eldonitan post 1960, kiun vi estas leginta. Donu kelkajn informojn pri ĝia aŭtoro, resumu ĝian enhavon, kaj prikomentu ĝian stilon.
6. Kiam kaj kie okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto? Kiel ĝi siatempe gravis en la Esperanta mondo?
7. Kiel la nuntempa Esperanta komunumo utiligas la plej modernan teknologion en sia lernado, laboro, kaj amuziĝo?
8. Priparolu la rolojn kiujn ludas tradukita literaturo kaj literatura tradukado en la riĉigo de la Esperanta kulturo kaj la evoluigo de la lingvo.

(20 poentoj)

## 3. Interparolo

*Por testi la kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas respondi demandojn kaj interparoli kun la ekzamenantoj pri du el la sekvaj temoj, hazarde elektitaj, dum tri aŭ kvar minutoj.*

1. Muziko
2. Vojaĝado
3. Moderna komunikado
4. Legado kaj libroj
5. Aktivado en la Esperanto-movado
6. Libervola komunuma aŭ civita aktiveco
7. Ŝatokupoj kaj sportoj
8. Loĝloko kaj loĝejo

(15 poentoj)